

Johann Wolfgang von Goethe, Egalaĵo (Nokto- kanto de mi- granto)	Johann Wolfgang von Goethe, Same	Johann Wolfgang von Goethe, Same tiel	Johann Wolfgang von Goethe, Super montoj regas kviet'
<i>tradukita de Manfredo Ratislavo</i>	<i>tradukita de Pejno Si- mono</i>	<i>tradukita de Richard Schulz</i>	<i>tradukita de Poul Thorsen</i>
Super ĉio iĝas Kviet', Kaj ne moviĝas Pro ventet' Iu foli'; Silentas la birdoj ĉirkaŭe. Atendu – baldaŭe Ripozos vi.	Super montopintoj – silent', tra pinopingo la senvent' spiras sen fort'; arbare la birdoj ekmu- tas. Pretu, aludas silento pri mort'.	Super ĉiuj montoj Trankvil', Kaj ĉiuj fontoj Sen babil'; Aŭdas vi ne Birdetan ĉirpon arba- re. Pensu prepare Pri la pere'!	Super montoj regas kviet', tra l' foliaro nur ventet' spiras kun trem'. Birdoj arbare silen- tas, se vi atendas, pacas vi mem.
...	...	...	...

Traduko de la Germana poemo “*Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)*” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (*Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04*) en 1983-01.

MR-03-4 / Arg-356-707  
(2006-03-20 14:44:12)

Traduko de la Germana poemo “*Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)*” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de PEJNO SIMONO (*Simon Edward Adrian Payne, \*1941-12-23*).

Arg-356-1974 (2014-03-14 14:12:56)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://eo.wikipedia.org/wiki/Goethe>.

Traduko de la Germana poemo “*Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)*” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (*Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 – †1997-09-26*).

Arg-356-706 (2013-02-26 15:16:30)

Tiu Esperantigo aperis komence de la okdekaj jaroj de la 20a jarcento en la “*Vestfaliaj Flugfolioj*”, kiujn eldonis Rikardo Ŝulco (*Richard Schulz*), honora membro de Germana Esperanto-Asocio. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz). Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).

Traduko de la Germana poemo “*Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)*” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de POUL THORSEN (\*1915-01-07 – †2006-01-30).

Arg-356-708 (2010-05-28 21:34:24)

Poul Thorsen estis dana Esperantista poeto, kiu verkis multajn originalajn kaj tradukitajn poeziaĵojn en la Internacia Lingvo. Vidu ankaŭ: <http://www.poulthorsen.dk/> kaj <http://www.liberafolio.org/2006/forpasis-poul-thorsen/view>.